# EKO 2025

ILEI diligente agas kaj raportas

EKO 2025-43, Novembro 10  Pezo: Word 40, PDF 500 KB, Sen Alkroĉaĵo 540 KB

## ILEI raportas – niaj instruistoj aktivas

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri la trimonata agado, de julio ĝis oktobro.Ŝlosilpunktoj:

- rezultoj de la jara Komitatkunsido; ILEI-Kongresoj 2025-2027
- instruista trejnado en Burundo; gratulojn al Monika Molnár
- “Instruistoj de la Jaro”;  novaĵoj “Pri Viroj kaj Kunikloj”; universitata agado; UEA, INK, CED, Ĉina Komunikila grupo, irana amaskomunikilo

.

## Novembraj jubileoj

Legu la liston de Esperantaj jubileoj kaj memordatoj en novembro 2025, kompilitan de Aleksander Korĵenkov, ĉe https://sezonoj.ru/2025/11/novembro-12/ kaj ne forgesu sendi gratulojn al Seán Ó Riain (70 jaroj) kaj Osmo Buller (75 jaroj). Antaŭ 115 jaroj, la 2-an de novembro 1910, forpasis Paul Berthelot (1881-1910), franca presisto, anarkiisto, spiritisto kaj esperantisto; fondinto de Kataluna Esperanto-Grupo kaj de ties organo, kaj de la revuo *Esperanto* kiu ĝis nun aperas kiel la organo de UEA.

## Laboreblo en Francio

Kadre de Erasmus+ okazos interfaka programo pri Esperanto por studentoj, organizata de diversaj partneraj universitatoj. La programo havos distancan parton kaj surlokan parton (de la unua ĝis la kvina de junio 2026, Universitato de Tours, Francio). Vojaĝo-kostoj estos financitaj de Erasmus+, kaj la studentoj akiros ses kredit-poentojn (ECTS) uzeblajn en siaj propraj stud-diplomoj. Kandidatoj povas veni el la tuta Eŭropo, el diversaj diplom-niveloj, kaj el iu ajn studfako. Ne necesas jam scii Esperanton antaŭ la programo (inverse, se kandidatoj jam parolas Esperanton, ili estos bonvenaj!). La instrua lingvo estos la angla (postulata nivelo: almenaŭ B1). Limdato por kandidatiĝi: la **15-an de novembro**.

Programo: https://www.univ-tours.fr/medias/fichier/esperanto-bip-information_1760016824419-pdf?

Instagram: https://www.instagram.com/p/DPn3jgCDKe8/?utm_source=ig_web_copy_link&igsh=MzRlODBiNWFlZA==

Kontakto: philippe.planchon@univ-tours.fr

## Tropikaj melodioj en Brazila Muziko

Jen bona video farita de **Vicente Sales** de la kanto [Tropikulino] (originale *Morena tropicana*), verkita de **Alceu Valença**, laŭ traduko de **James Rezende Piton**:

.

## Strategiaj elektoj

Gravas pripensi, kion la Esperanto-parolantoj fakte deziras per kaj por Esperanto. Antaŭ dek jaroj mi formulis en diskuto de *Libera Folio* i pri diversaj tendencoj en Esperantujo. Estas laŭ mi almenaŭ ok tendencoj en Esperantujo, kiujn oni povas mallonge nomi:

- **Desuprismo** ("ni postulu por Esperanto unu plian fojon dekfoje tiom kiom ĝi meritas en la nuna fazo - kaj poste ni havos unu plian ŝancon plendadi pri aĉaj politikistoj kaj ŝtatoficistoj"),
- **Desubismo** ("per daŭra kresko al la fina venko"),
- **Deflankismo** (konvinki lingvistojn k.s.; ne tute facila tasko jam pro la fakto, ke ili gajnas sian panon per la konkurencantoj de Esperanto...),
- **Subvencioj** ("ĉio bonas, dum mi kaj miaj proksimuloj ricevas ilin **Kreskigo** (amaskomunikilaj rilatoj, varbado, kursoj),
- **Kulturo** (kreado), **Ĝuo** (eble la plej ŝatata),
- **Stagnemo** ("estas tiom gemute en nia kara Esperantujo; tro da novuloj povas nur ĝeni...").

"La projekto koncernas tiun grupon: Ronald Glossop, Rob Moerbeek kaj Renato Corsetti. Kvankam pretigita en 2015, ĝi estas en la komenca fazo de realigo. Menciindas, tamen, ke, kun la beno de Renato, la libro disvendiĝis tra la libroservo de UEA. Korektis Rob Moerbeek, enkondukis Ronald Glossop.

1. **Sendis** Michela Lipari

## Asocioj prezentas sin per itala iniciato

La prezidantoj de IEF (Laura Brazzabeni), UEA (Fernando Maia), EEU (Seán Ó Riain) kaj ILEI (Ahmad Mamduhi) prezentas sian asocion al la tuta mondo.

KIAM: la 18-an de novembro 2025 je la 20.00 UTC (en Eŭropo 21.00 UTC+1)

Oni atendas vin. Jen la ligilo:

https://us02web.zoom.us/j/83493164114?pwd=M3x7hdhbxive3MKMKLNqd7dw8xGoMz.1

ID: 834 9316 4114; pasvorto: ESPERANTO

Prof. LAURA BRAZZABENI.Presidente FEI

+393286461063 ankaŭ WHATSAPP)

## Tra la mondo iras forta VK

La 6-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK) okazos de la 4-a ĝis la 7-a de decembro 2025 (de ĵaŭdo ĝis dimanĉo) kaj ĉiuj jam povas aliĝi (https://vk.esperanto.net/2025/aliĝilo) al ĝi. Ĉu vi scias, ke ĉiuj individuaj membroj de UEA en 2025 rajtas senpage aliĝi? Jes, sed nur se vi aliĝos ĝis la 23-a de novembro! Se vi ankoraŭ ne estas individua membro de UEA, vi povas per la sama paĝo rapide (re)membriĝi en UEA kaj samtempe aliĝi (senpage) al la VK. Kaj pro tio estas speciala oferto! Vi pagos jam la membrecon por 2026 kaj tuj ricevos samtempe kaj tute senpage membrecon ankaŭ en 2025 kaj aliĝon al la 6-a VK!

La ĉi-jara temo estas “Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj”.  Pro administraj optimumigoj okazos grava ŝanĝo ankaŭ en la ilo uzota por gastigi programerojn: okaze de la 6-a VK estas planate utiligi la platformon *Discord* (https://discord.com), per kiu ĉiuj programeroj kaj laŭtemaj babilejoj troviĝos en unusola kanalo. Platformo facile uzebla, tre alloga por junuloj kaj jam uzata de pluraj Esperanto-organizaĵoj kaj aliaj retaj eventoj, *Discord* ebligos, ke la etoso de la 6-a VK restu moderna kaj alirebla por ĉiuj. Eblas aliri al *Discord* per aplikaĵo aŭ rekte per retumilo, tiel ke vi povos partopreni en la 6-a VK. Estos uzataj ankaŭ *Zoom* kaj aliaj rimedoj.

## Kosmos pri vegetarismo

Vegetarismo kaj amo al la bestoj – de Ole Therkelsen – La rigardo de la estonta homo pri viandomanĝado.  La monda moralo aŭ la religia gvidado dum la lastaj jarmiloj plejparte estis agorditaj al amo al homoj de la sama familio, grupo, nacio aŭ religio. La plimulto opinias ke la amo al la proksimulo ampleksas amon nur al homoj, sed ne al bestoj aŭ al mikroestuloj. Sed la nova monda impulso, kiu pasadas sur la terglobon, reprezentas novan mondan moralon, agorditan ankaŭ al praktikado de amo al la vivantaj estuloj en la mikrokosmo.

## Kostarika kurso

Mi liveris mian proponon de la programo de Esperanto laŭ la nova strukturo de la kariero de Hispana Filologio en la Universitato de Kostariko. Ĝi estos postbakalaŭra kaj malferma al ĉiuj membroj de la universitata komunumo. Mi devis ĝin prepari tre rapide, ĉar oni donis tre malmulte da tempo por ĝin pretigii, apenaŭ kelkajn tagojn. Jen la tradukita priskribo de la programo:

"Ĉi tiu kurso celas enkonduki gestudentojn en la lingvan kaj kulturan studon pri Esperanto, kiel planlingvo kaj socikomunika fenomeno. Ĝiaj gramatikaj, leksikaj kaj fonologiaj fundamentoj estas traktataj, samkiel ĝiaj historia evoluo kaj rolo en la kunteksto de internaciaj lingvoj. Per la analizo de tekstoj, korpusoj kaj instrumaterialoj, la gestudentoj esploros kiel Esperanto evoluis de idealisma koncepto al vivanta komunumo kun literatura produktado, intelekta tradicio kaj tutmonda estiĝo.

La kurso enkondukos gestudentojn en ankaŭ interlingvistikon, kiel fakon analizantan la dinamikon de interkultura komunikado kaj planlingvojn kiel esprimojn de lingvaj

konceptado kaj kreado. La kurso analizos la historiajn kialojn de Esperanto kiel respondo al lingvaj kaj kulturaj malegalecoj, samkiel ĝian nuntempan gravecon en diskutoj pri egaleco, tutmondiĝo kaj lingva diverseco. La fokuso de la kurso estas kaj teoria kaj praktika. Gestudentoj akiros bazajn kapablojn en Esperanto, komprenos ĝiajn internajn strukturojn, komprenos ĝian komunikan funkcion kaj kritike komprenos ĝin en la kunteksto de naturaj kaj konstruitaj lingvoj."

Je la 31-a de oktobro estis kunveno por diskuti ĉiujn proponojn, inter ili tiu de Esperanto. La lingvo havas la subtenon de pluraj gekolegoj, inter kiuj la direktorino de la Instituto pri Lingvistikaj Esploroj.

## Balkana-Danuba kunlaboro

Tiu kunsidis la 18-an de oktobro

**Planita tagordo:**

1. Gasto: Sean Ó'Riain - prelego.
2. Informado: raportoj laŭ landoj.
3. Instruado: raportoj laŭ landoj.
4. Utiligado: ĉio cetera...
5. Interkonsento pri la venontaj kunvenoj, tempo laŭ UTC/GMT dum vintra tempozono.

Gastigantino: Aurora Bute

Konstanta organizanto: Gradimir Kragic, Bosnio-Hercegovina

========= vortoj: 1120 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**Kvarddek numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.